

Leterkesto kaj la nuna situacio de esperanto  
Claude Gacond, 255-a radioprelego, 1968.08.28 & 31

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Pola aŭskultanto, sinjoro Andreo Marszatkowski en Kartvzy, esprimis en interesa letero sian vidpunkton pri la valoro de historiaj studoj. Aŭdu lian vidpunkton, kiu tutcerte respegulas la sintenon de la plimulto de la esperantistaro.

A.- « *La historiaj prelegoj, ekzemple pri Volapük, estas vere interesaj, sed por la estonto nenion donas. Historiaj aferoj jam estas historio. Ni devas tuŝi aktualajn temojn, ekzemple kiel nun progresas la Esperanto-movado en diversaj partoj de l' mondo kaj kion fari por ĝin pli prosperigi.* »

Cl.- La vidpunkto de nia samideano estas bazita sur la ideo, ke la historio ne influas la nunon, aŭ ke ne estas necese koni la pasinton por okupiĝi pri aktualaĵoj.

A.- Ankaŭ ni pensas, ke en niaj prelegoj ni devas tuŝi aktualaĵojn, sed ni pensas, ke tiujn aktualaĵojn oni malfacile komprenas, se oni ne kapablas ilin vicigi en historian procezon.

Cl.- Historiaj studoj ne nur estas interesaj en si mem. Ili lumigas la nunon. Homo sen memoro ne povas normale labori. Same estas por homaj socioj.

A.- Por povi mezuri la progresojn aŭ regresojn de nia movado, ni devas koni ne nur aktualaĵojn, sed la pasintaĵojn.

Cl.- En multaj fakoj esperanto stagnas. Laŭ nia vidpunkto unu el la kaŭzoj de tiu stagnado troviĝas ĝuste en manko de kontakto kun la pasinto.

A.- Entuziasme la esperantistoj lanĉas varbkampanjojn, kiuj tro ofte kondukas al seniluziiĝo. Tio malpli ofte okazus, se antaŭ ol sin ĵeti en la agadon, la esperantistoj inspiriĝus de la pasintaj eksperimentoj.

Cl.- Tuj post la unua mondmilito sub la patronado de la Instituto pri la Eduksciencoj en Ĝenevo oni organizis enketojn pri la instruado de Esperanto. Kongresoj grupigis en Ĝenevo kaj Prago centojn da edukistoj. Oni alvenis al interesaj konkludoj pri la influo de la instruado de nia lingvo. Oni sentis la limojn de tiu instruado kaj la neceson ĝin perfektigi por eviti seniluziiĝojn.

A.- Sen kontakti Pierre Bovet, la tiaman direktoron de la Instituto pri la Eduksciencoj, nek Edmond Privat, lian ageman helpanton kaj la organizanton de tiuj kongresoj, nek sinjorinon Henriette Ith, lian sekretariinon, sen okupiĝi pri la pasintaj eksperimentoj, dek jarojn post la dua mondmilito UEA kaj ILEI lanĉis novan kampanjon por la instruado de esperanto en la lernejoj.

Cl.- Oni aŭdas nun plendojn pri la fiasko de tiu kampanjo. Oni seniluziiĝas. Supraĵa entuziasmo anstataŭis atentan programigon kaj racian agadon de la kampanjo. Diletantismo anstataŭis studadon de la nuna situacio kaj de la pasintaj eksperimentoj. Kaj kio okazis? Oni malfermis senkonsidere kursojn sen okupiĝi pri la sekvoj, oni plenigis statistikajn tabelojn, oni miris pri la propraj sukcesoj.

A.- La gelernantoj rapide progresas. Post la elementoj kion instrui al ili? La instruistoj ne estis pretaj por alfronti tiun demandon. Ili laciĝis. Seniluziiĝo anstataŭis la facilan entuziasmon. Kaj se oni provas konkludi, oni retrovas la asertojn de niaj antaŭuloj.

Cl.- Se en nia movado oni estus havinta pli da kontakto kun la pasintaĵoj, oni ne estus tiel facilanime lanĉinta tiun kampanjon. Unue oni estus provinta vidi, kio faciligas la instruadon

Leterkesto kaj la nuna situacio de esperanto  
Claude Gacond, 255-a radioprelego, 1968.08.28 & 31

de nia lingvo, kaj kio ĝin malhelpas. Oni estus poste pretiginta laborplanon, kies celon estus diskutintaj la instruistoj antaŭ la lanĉado de la kampanjo.

A.- Tia pripensita kampanjo ne okazos, tiom longe kiam la esperantistaro ne konos sian pasinton. Atendante tiun tempon ĝin anstataŭos la diletantismo de homoj ofte tre sindonemaj kaj entuziasmaj, kiuj okupiĝas pri esperanto nur kromprofesie.

Cl.- Ni ĉerpis ekzemplon en la instruado, ĉar tio estas nia fako. Ni estus povintaj prezenti aliajn ekzemplojn. Ni uzis la pronomon **oni**, ĉar fakte ni ĉiuj respondecas pri tiu situacio.

A.- Ĝis hodiaŭ la esperantistoj vivis en la nuno, aŭ eĉ pli ĝuste, en la estonto. Kun la jaroj tiu sinteno kondukas al kriza situacio. Kiam pioniroj de la unuaj horoj ankoraŭ vivis, nia movado posedis specon de memoro. Sed dum la pasintaj jaroj, unuj post la aliaj, tiuj pioniroj malaperis. Kun ilia morto estingiĝis la memoro de nia movado, malaperis valoregaj arkivoj.

Cl.- La spuroj de nia kolektiva agado malaperas. La nova generacio subite malkovras, ke studoj pri nia lingvo, pri niaj pioniroj, pri niaj verkistoj, pri nia komuna penso, pri nia psikologio, bedaŭrinde ne ekzistas aŭ ege raras. Kaj ilia manko malhelpas kontentigan progreson

A.- Pro manko de supera instruado nia historio ne estas konata. Tiu nekono malhelpas la superan instruadon. Popolo sen lernejoj, ni perdis kontakton kun nia propra kulturo. Kiam ni vidas libro-standon, ni hazarde aĉetas senvaloraĵojn preterlasante la verkojn legindajn.

Cl.- Esperanto-entreprenoj, kiuj devus progresi aŭ almenaŭ ne pereji, ne ricevas la necesan subtenon de la grupoj kaj asocioj, dum nia energio perdiĝas en diletantaj revoj. Jen la nuna situacio de nia movado, Jen la aktualaĵo.

A.- Tiu situacio similas al tiu, kiu ekzistas en la malriĉaj landoj. Ĉio estas fareda, sed mono kaj fakuloj mankas. Kaj samtempe konscio pri la propra originaleco nebulas. Ĝi esprimiĝas ne per kulturaj rimedoj, sed per folkloraj kutimoj. Ne konante sian literaturon, sian historion, sian latentan forton, la esperantistaro kulturas la adoradon al la verda flago. La kantado de la himno anstataŭas la deklamadon de pli valoraj poemoj, la adorado al la zamenhofa busto anstataŭas la studadon de lia penso.

Cl.- La nova generacio sentas la bezonon rompi kun tiuj sektemaj kutimoj. Sed tiu rompo kondukas al neniigo de la lingvo mem, kiam nenio venas anstataŭi la himnon, la flagon kaj la kulton de la zamenhofa personeco.

A.- Per niaj historiaj prelegoj, eĉ per studoj pri Volapük, ni deziras alporti al la esperantistaro ion pli nutran ol babiladon pri la progresoj aŭ malprogresoj en diversaj esperantaj grupoj. Ni volas lumigi la aktualaĵojn. Ni volas redoni al nia movado memoron, kiun ĝi perdas.

Cl.- Se la esperantistaro ne kapablas dum la nuna generacio ekkoni sian pasinton kaj malkovri sian originalecon, ĝi alvenos al krizo, kiu riskos ĝin pereigi. Ni ne forgesu, ke Esperantujo estas etega mondo kompare al la alilingvaj mondoj. Oni devas eviti al nia mondeto mortigan krizan situacion.

A.- Ni esperas, ke per tiuj kelkaj vortoj ni respondis al la letero de nia pola samideano kaj samtempe al aliaj geaŭdantoj. Ni scias, ke nia nuna sinteno estas ŝatata de multaj geaŭdantoj, tamen ni ŝatus povi diskuti kun ĉiuj, kiuj havas demandojn. Esprimu viajn vidpunktojn, kaj ni diros la niajn.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-